


BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ



Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.



CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA. SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVARNA „UNION". KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38. REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za ;eho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů. Roč. I.—IV. pro členy B.U.E. po K 2·20.

Klub Esperantistů v Praze („U Donátů") dává svým členům tuto revui zdarma.

1911. **BŘEZEN — MARTO.** **V. 3.**

Roční předplatné: 3 K.

Roč. I.—IV. po K 2·50.

Cena tohoto sešitu s přílohou: 30 hal.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů“, Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Casopis Českých Esperantistů“ en Praha II. (Bohemujo - Aŭstrio). II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskripton por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj prefere akceptataj

* Účet poštovní spořitelny 93.281. *

ČEŠTÍ ESPERANTISTÉ PŘEDPLÁCEJTE SVŮJ ORGÁN **Časopis Českých Esperantistů,** *který vychází o 20 stranách s literární přílohou.* **Před***platné 3 K (pro sdružené kluby K 2·50 při hromadné objednávce.)*

Bohema Revuo Esperantista aperados po 20 pĝ. kun literatura aldono.

OBSAH — ENHAVO:

LITERATURA ALDONO: **BABIČKA-AVINETO** de Božena Němcová. (Pokr.). Trad. *Vl. Tobek.*

Svatopluk Čech: Terura mistero. Trad. —*tr.* — Vizito ĉe dr. Zamenhof. — Pli multe da sincera kritiko! — *Mario de Ebner-Eschenbach*: Ŝonĝo en Sonĝo. Trad *J. Schröder.* — Sen titolo. — Parto oficiala. — Esperanta movado inter Bohemoj. — Z celého světa. — Korespondantoj.

ADRESÁŘ ČESKÝCH ESPERANTISTŮ-KORESPONDENTŮ

s oficielní Ročenkou B. U. E.

bude rozeslán spolkům Esp. do celého světa. **Zápisné 40 hal.** Zapsaným bude zaslán exemplář zdarma. *Odpověď těm, kdo reklamují*: Dokud nebude nám zasláno ještě 40 přihlášek, nemůžeme adresář vydati!

Svatopluk Čech :

TERURA MISTERO.

EL „ŜABLONOJ POR SENTIMENTALAJ RAKONTOJ“.

Kiu estis neniam en la vilaĝeto L., ne rimarkis tie certe grizkoloran dometon frapante distingiĝantan de la afablaj, per vintrunkoj girlanditaj najbaroj. Hiskiamo kaj urtikoj en fendoj de la sojlo, rustiĝinta sonoriltirilo ĉe la pordo, eterne mallevitaj kurtenoj en la fenestroj, kamentubo melankolie flankenklinita — ĉio havis sur si sigelon de ia teruroplena, de neniu elesplorita mistero. La homoj evitadis ĝin, ĉieulinoj hirundoj kaj saĝumuloj cikonioj estus preferintaj alglui siajn nestojn al najbaro Hargratanto post la orelon — tre maltrankviligata loko — ol sur la muron kaj la kamentubon de la mistera dometo.

En tiu ĉi dometo loĝis antaŭ jaroj viro, pro kiu la scivolemaj vilaĝanoj preskaŭ la kapojn al si rompis. Neniu sciis, de kie li devenas, kial li venis kaj kiel li estas nomata, kio li estis kaj per kio li vivtenis sin, ĉu efektive aŭ kiun religion li havis, kia estis lia pasinteco, kaj preskaŭ eĉ tion ne, kiel li propre aspektis. Ili sciis nur danke la rakontemon de maljuna Bartáková, posedantino de tiu ĉi dometo kaj de ŝia filino Ludmilo, ke foje dumkrepuske fremda viro enpaŝis ilian ĉambron kaj proponis al ili neproporcie altan lupagon por la luigo de la dometo. La maljuna kaj la juna koincidis en tio, ke la fremdulo havis sur si alpremiĝan, nigre kaj blanke kvadratitan veston, ke li estis neordinare altstatura, poste, ke li distingiĝis per densaj nubaj brovoj kaj per karbonigraj haroj kaj barbo, kun kio akrege kontrastis malvivula paleco de la vizaĝo kaj neĝa blankeco de la dentoj. Tamen laŭ priskribo de maljuna Bartáková li havis sovaĝajn, penetremajn okulojn kaj iun ironian mienon de la vizaĝo, kontraŭe Ludmilo rimarkis nur malĝojan, de okulharoj duone kovritan okulon kaj doloran rideton sur la lipo. Plue sciis la najbaroj el rakontemo de la ambaŭ virinoj, ke ili akceptis sen pripenso la proponon de la sinjoro en kvadratita vesto, kiun li akompanis per elpago de la tuta jara luprezo kaj ke ili elkondiĉis por si nur loĝi en la posta alkonstruaĵo, por kio ili devis promesi, ke ili alportados al la lupreninto nutraĵon en difinitaj horoj kaj ke ili ordotenos la unuajn tri ĉambrojn, sed en la kvaran ke ili

sub perdo de eterna beateco eĉ per ombro de la ŝuo ne enpaŝos. Tiun ĉi lastan alineon de la kontrakto ili plenumadis konscience, ĉar la malpermesita ĉambro estis ĉiam de interne per ŝlosilo kaj riglilo fermita kaj la lupreninto preskaŭ neniam foriĝis el ĝi. En la antaŭaj ĉambroj ili neniam atrapis lin. Ŝajnis, ke li per akregsenta aŭdo elspionas, ĝis la susuro de iliaj pantofloj finsonos en la koridoro kaj ke nur poste li forlasas la misteran kabineton por iri en la ceterajn partojn de sia loĝejo. La vazojn kun manĝaĵo, kiujn ili tagon post tago metadis en la antaŭan ĉambron sur tableton, ili trovis tie ĉe la reveno ĉiam malplenaj kaj apud ili de tempo al tempo belaspektan rulaĵon da dukatoj, kiel paŭŝalon por nutraĵo kaj priservo. Sen tiuj ĉi pruvoj de lia ekzisto ili devus konsideri sian lupreninton ia nevidebla, fantoma estaĵo. Kvankam ili dediĉis ĉe la enordmetado de la ĉambroj specialan zorgon al la pordo de la kvara ĉambro, ili ekaŭdis post ili neniam eĉ plej-mallaŭtan voĉeton aŭ brueton . . . Terura, tomba estis tie silento, ke ofte eĉ teruro ilin ekregis!

Tiuj ĉi komunikoj de la ambaŭ virinoj estis la solaj mal-abundaj radioj en la vastan mallumon, kiu vualis la tutan personon de la fremdulo. La baptano noktogardisto volis kvankam al tiuj ĉi radioj aligi sian flagretantan lanternon kaj babilis ion pri nigra, kovrita veturilo, kiu haltis foje noktmeze antaŭ la griza dometo kaj el kiu enkuris blanka virina figuro en la loĝejon de la fremdulo, pri du nigraj ombroj, kiuj alian fojon videble konturiĝis sur la vualitaj fenestroj de la kvara ĉambro, pri strangaj sonoj kaj voĉoj, kiuj laŭdire nokte aŭdiĝas el tiu ĉi ĉambro: sed la mal-juna Bartáková akiris majoriton de la najbaroj por sia opinio, ke la devenon de nigra kaleŝo kun blanka sinjorino, de la ombroj en la fenestro kaj de strangaj sonoj kaj voĉoj, decas serĉi en la volvoplektita boteleto, kiu tintis je la ventro de la baptano n okta gardisto.

Ju malpli estis satigata la scivolemo de la vilaĝanoj, des pli intense ĝi ekregis iliajn mensojn. Starante, marŝante, ili meditis pri la terura sekreto de la fremdulo; ĉar ke nur terura mistero povas malliberteni la sinjoron en kvadratita vesto kaj kun sen-funda saketo da dukatoj en forlasita vilaĝo en griza dometo, pri tio dubis neniu el ili. Mem la estro de la civito, arĝentohara mal-junulo kun veŝto de flartabako makulita, kiu al sia alta aĝo havis grandan respekton kaj sentigadis ĝin al si per kortuŝa maniero, elĉerpis foje el sia flartabakujo kun granda flartabakpreno ideon, ke li povus honorigi la misteran fremdulon per rigardo sur siajn honorindajn grizharojn kaj ĉe tiu okazo ke li povus demandi lin pri la nomo, karaktero kaj aliaj aferoj, sed li ĉesis — kiel kutime — ĉe sola tabakpreno.

Foje ŝajnis, ke la densa vualo, je kiu tiom da manoj vane sin etendis, memvole disŝiriĝos. Kiam scie, foje Ludmilo senpolvigadis la pordon de la kvara ĉambro per sia orelo, ekgrincis interne subite ŝlosilo kaj pli frue, ol ŝi povis preni kun brosbalailo senkulpan pozicion, elkuris la viro en kvadratita vesto el sia kaverno kaj ektondris je ŝi, fulmante terure per la okuloj: „Ha, lacerto, ĉi volas forklini kovrilon de la mistero, kiun mi por eterne entombigis en mia animo, kie estas entombigitaj tiom da revoj kaj esperoj, kie estas entombigita la tuta bela mondo kaj mi mem en ĝiaj ruinoj?!“ Li ekridegis kiel frenezulo. „Entombigita — entombigita! Eĉ la trumpeto de la anĝelo nin ne vekos. Entombigita kredo, amo — ĉio! ĉio!!“ — Subite moliĝis kaj tremiĝis sono de lia voĉo, liaj okuloj duone kovriĝis per okulharoj kaj malseketiĝis: „Ne volu, knabino, forŝovi la vualon de mia mistero; ĉi mortus pro teruro kiel Egipto antaŭ nuda bildo de la vero!“ Li revenis rapide en la ĉambron kaj fermis post si.

Tiu ĉi okazintaĵo fulme disportiĝis tra la vilaĝo kaj antaŭiĝis super ĉiu dubo la konjekton, ke la fremdulo havas grandan misteron, kaj ke tiu mistero estas de terura karaktero. —

La vilaĝon bategis per nigraj flugiloj tondra nokto. Per fajfanta vipo pelis antaŭ si la vento amasegon da nigraj monstraj nuboj sin ĉirkaŭlekantaj per fajraj langoj de fulmoj. Tondrado — fulmado — blinda mallumo — okulkreviga brilo. Terura nokto! Anĝelo gardanto ĉirkaŭflugu la migranton super kruta abismo, ĉirkaŭitan en vasta arbaro de tiuj teruraĵoj! Vipita per propraj harbukloj, li elrulas la okulojn dekstren kaj maldekstren en la malamikegan batalon de la elementoj: centjaraj kverkoj, arke kurbigitaj de ventego, formas super li foliplenaĵn pordegojn, ĉieltuŝantaj pinoj brufalante baras al li la vojon; de la alia flanko minacas al li zigzagaj rokoj per ŝtonaj fingroj, je kiuj frakasiĝas katarakto de supre fluganta trans la vojon en flokoj de blanka ŝaŭmo. La timigita migranto transgrimpas amasojn da elterigitaj arboj, la ŝtonegojn deruliĝintaĵn sur la vojon, li kuregas kvazaŭ de demono persekutata, kun flirtantaj malsekaj haroj, ne atentante la dornaĵon kaj branĉojn, kiuj ĉifone disŝiras lian veston, nek akrajn ŝtonojn, kiuj enpikiĝas en liajn sangajn kalkanojn . . . Kaj super li, ĉirkaŭ li ĝi ŝaŭmas, muĝas, krakas, vipsonas, kriegas, tondras, hundblekas, ĝemas el profunde, sopiras, grincas, knaras, ruktas kaj bruegas, kvazaŭ miliono da arbarfantomoj orgius post li.

Mi bedaŭras, ke mi ne havas sur mia rakontista paletro ankoraŭ pli efikajn kolorilojn, por ĝuste priskribi la teruraĵojn kaj la fantomecon de tiu ventega nokto.

Apenaŭ reakirante la spiron, atingis la migranto la vilaĝeton kaj haltofalis sur sojlon de la griza dometo. Li kuntiriĝis tie sub

favorkovro de ŝinda tegmento kaj rigardis — nun sen timo — la batalon de la elementoj ekstere.

Subite li elsaltis. Li ekaŭdis interne de la domo bruon kiel pistolpafon, poste doloran ekkrion kiu trapenetris liajn ostojn, brufarantan falon de io sur la teron, malfortiĝantan helpovokadon, ĝemadon — poste ekregis tie tomba silento. Terurite ekprenis la migranto la rustiĝintan sonoriltirilon kaj komencis sonorigi, frapi, voki per ĉiuj fortoj. Interne teruriga trankvilo, sed el la alkonstruaĵo kaj el la najbaraj barakoj kunkuradis blankaj figuroj kun lanternoj en la manoj. Ili amasiĝis ĉirkaŭ la pordo. La migranto rakontis al ili per nekontinuaj frazoj, kion li ekaŭdis en la dometo. Iuj forkuris por venigi seruriston kaj la vilaĝestron.

La seruristo malfermis la pordon. Aro da vilaĝanoj enkuris en la loĝejon de la fremdulo. Antaŭ la pordo de la kvara ĉambro ili haltis kvazaŭ laŭordone. Multaj tremis kiel tremoloj kaj dentoklakis. Ili staris ja sur sojlo de terura mistero, kiu tiom longe streĉadis ilian scivolemon. Fine la pli kuraĝaj elhokigis la fatalan pordon. Terurega spektaklo aperis al ĉies okuloj. En senmebla, malplena ĉambro, sur kies planko briletis ĉi tie kaj tie disĵetitaj dukatoj, kuŝis sur la planko etendita longa viro en kvadratita vesto, per unu mano tenante la pistolon kaj la alian havante alpremita al la koro, de kie disverŝiĝis sur la plankon torento da nigra sango. Marmora paleco de la vizaĝo kaj blankeco de la dentoj terurige kontrastis de la karbonigraj barbo kaj haroj. Pro teruro brosleviĝis ankaŭ la honorindaj grizharoj de la vilaĝestro. Sed la mistero de la fremdulo? Kie estas la ŝlosilo al la terura mistero?! Oni traserĉis ĉiujn angulojn de la ĉambro, traesploris ĉiujn poŝojn kaj faldojn de la kvadratita vesto — ĉie malplene, nenie eĉ linieto, eĉ signeto, eĉ akvoguto por ilia ardanta scivolo. Ili rigardis la marmoran vizaĝon, kvazaŭ por tie atendi la solvon de la granda enigmo: sed la kurbigitaj lipoj kvazaŭ mokus ilian vanan, stultan esperon. La malfeliĉulo forportis la teruran misteron kun si en la eternejon, kien mi ankaŭ asignas la scivolemajn legantojn . . .

Trad. —*ír*.

VIZITO ĈE DR. ZAMENHOF.

La rusa gazeto Sev. Zap. Telegraf enpresis paroladon de s-o A. M. Nedoŝivin, kiun li prezentis ĉe la kunsido de la Societo Esp. en Kovno kaj en kiu vidiĝas kelke da interesaj detalajoj koncernantaj nian Majstron. La aŭtoro rakontas pri sia vizito ĉe Dr. Zamenhof, kiu, aludante la nunan staton de propagando, esprimas sian opinion, sendube pravan, pri jenaj demandoj: Oni

utiligu por nia propagando tre singarde la gazetaron nacian, kaj nepre kun gvido de spertaj, konataj Esperantistoj, por ke tro oftaj priesperantaj artikoloj ne tedu la legantaron kaj ne atingu la malan efikon. Plene aprobinde estas organizi en unu ĉefurba gazeto regulan, solidan propagandon; redaktadon de artikoloj de principa karaktero Dr. Zamenhof prenus sur sin mem. Plue, kiel raportas ankaŭ „La Ondo de Esperanto“, atentigas nia Majstro pri signifoplena trajto en la historio de E.: „Ekzistis en nia historio periodo, kiam la plej ĉefaj agantoj kredis, ke la plej grava kaj sola venkilo estas konverto de la registaro, laŭ kies ordono E. povus rapide, facile penetri ĉien. Ekster la devigaj rimedoj „desupre“ la adeptoj de tiu doktrino ne vidis la utilon kaj signifon de privata, eĉ societa propagando.“ La Majstro kategorie protestas kontraŭ simila unuflanka kaj erara taktiko, kiu povas malutili kaj eĉ tute pereigi nian komunan aferon. Estas vero, ke komence, danke la registaron, E. estus enkondukita en la kurson de mezaj kaj elementaj lernejoj, sed poste, ĉar la publiko ankoraŭ ne estas preta por la nova, nekonata lingvo, E. verŝajne restus sen ia uzado kaj eĉ kredeble sekvigus ian publikan proteson kontraŭ la senbezona scio. Tiam E. pereus por reviviĝi neniam. Krom tio la nova lingvo postulus kolosan laboradon de sciencistoj kaj entuziasmaj agistoj, ĉar alie ĝi ne taŭgus por la rolo de lingvo ĝenerale kaj de lingvo internacia speciale. Eble nur en la nuna tempo estas dezirinda la partopreno de la registaro, tamen sen troa rapidigo kaj penigo. Por la grandioza konstruaĵo, nomata Esperantismo, ni unue bezonas firman, fidindan fundamenton, t. e. la sankcion de la publiko kaj plenan pretecon rilate la enkondukon de Esperanto — la pretecon de ĉio aparte, de ĉiuj kune kaj — ĉefe — de la lingvo mem. Kiel la mezan, peran ŝtupon por la oficialigo de E., dr. Zamenhof montris la sankcion per gazetoj kaj libroj. Tuŝante la libran literaturon, li esprimis la ideon, ke la plej utila por la esperantema popolamaso estas malkara propaganda broŝuro kun lernolibro. Li ankaŭ opinias utila tradukon de mallongaj lernolibroj geografiaj, aritmetikaj, historiaj k. s.; krom tio li rekomendas tradukadi la naciajn klasikulojn. Li eĉ ne forgesas pri valora servo de propagandistoj-oratoroj, kiuj, estante talentaj spertuloj, povus per helpo de speciale fondita societo kolekti la bezonajn monrimedojn. — Je fino de la vizito legis Dr. Zamenhof al sia gasto leteron de la princino de insulo Samos, propramane skribitan, kiu antaŭvidas grandan utilon de E. por sia popolo, kaj, admirante la grandan kreaĵon de Zamenhof, esprimas al li tutkoran dankon.

Leginte pri la ideoj de nia Majstro, ni rememoriĝu, en kia grado ili estas plenumitaj ĉe la bohemaj Esperantistoj: Regulan informadon de la publiko pri E. prizorgas nia konata amiko s-o

V. Veverka per speciala rubriko en la semajna gazeto Národní Obzor (en Praha), por la plej vasta propagando estis uzitaj kvindek miloj da ŝlosiloj de Ĉefeĉ, koncerne la tradukaĵojn ni atentigas pri la premiita gvidlibro „Praha" kaj fine, rilate la oratorojn. ni aludas la taskon, kiun difinis al si nia Propaganda Societo. La vortoj de nia Majstro estas tre interesaj kaj lian opinion aprobas certe ĉiu leganto.

PLI MULTE DA SINCERA KRITIKO!

En Bulgarujo aperis nova lernolibro de s-o P. — erarplenega. La gazeto „Danubo" tre prave atentigis pri tiu ĉi danĝera propagandilo, kiu povas alporti sole malbonon por nia afero. La recenzinto s-o At. D. Atanasov citas la erarojn kaj turniĝas poste per jenaj vortoj al la aŭtoro: „Mi estas certa, ke nur via sincera deziro alporti al nia afero helpon igis vin verki la lernolibron, sed mi estas certa ankaŭ, ke vi konscios la gravan eraron, kiun vi faris per ĝi. Por viaj antaŭaj lernolibroj, kvankam ankaŭ erarplenaj, vi meritis nian dankon, per la nuna, kiu venas post jam aperintaj bonaj lernolibroj, vi meritas nian riproĉon. Al vi mankas fundamenta kono de nia bela lingvo, kaj ĉefekono de ĝia stilistiko." Tia sincera kritiko estas pli laŭdinda, laŭ opinio de ĉiu amiko-Esperantisto, ol hipokrita cito de la verko kun kelke da sengustaj frazoj diktataj da la amikeca, pacifisma ideo de esperantismo. Pli bone estas averti la publikon ol helpi konscie, ke erarplena verko malutilu la lingvon. Se la aŭtoro ofendiĝos kaj indigniĝos (certe li retrovos post kelka tempo, ke li ne estis prava), pli bone estos, ol ke li daŭru, instigata de hipokritaj aproboj, verkadi tian literaturon! Cetere, ĉu estas tolerate, ke la nacilingvaj lernolibroj enhavu tiajn erarojn? Ĉu la kritiko silentas? Ne helpas instrui private similan aŭtoron, kiu eĉ en siaj privataj leteroj elmontras mankon de scio pri nia lingvo: tamen lia verko aperos presita pli frue ol ĝia manuskripto meritas veni en kompostejon. Tial oni ne timu respondi kaj publike atentigi laŭmerite je tia verko, precipe je lernolibro, kiu, estante eldonita prese, povas alporti la nia laboro sole malutilon.

Aperas nun demando: Ĉu konvenas ke oni kritiku en Esperantujo? Ni spertis, ke multaj samideanoj opinias, ke nek la faroj nek la verkoj de la aliaj samideanoj estas riproĉeblaj eĉ se ili estas riproĉindaj. Tia malbona opinio povus esti por nia tuta laboro memvola mortigado, ĉar la plej senvaloraj verkoj, tolerataj sekve en nia literatura trezorejo, unuflanke venenigus la lernantojn, aliflanke prezentus la plej taŭgan argumenton kontraŭ nia lingvo mem en la manoj de kritikemaj skeptikuloj. Kiel ni jam

diris, ni prefere diru la krudan veron eĉ se ĝi rilatas amikon, kiu volis laŭ sia erara opinio helpi Esperanton, ol toleri, ke esperanta literaturo fariĝu rubejo. Precipe estu tia devizo aplikata ĉe kritiko de lerniloj. Amu pli multe Esperanton ol samideanon! Vi demandos eble, ĉu la „interna ideo de Esperantismo“ permesas al ni tiel konduti. Eĉ se ĝi ne permesus tion, la simpla amo al vero kaj estimo de nia propra laboro ĝin ordonas. En tia okazo estas ĉiu almontrado je „Esperantismo“ ridinda — infana.

Mario de Ebner-Eschenbach:

SONĜO EN SONĜO.

Mi sonĝis, ke mi elpensis perfektan aerŝipon kaj venis per ĝi al loko tiel malproksima en la universo, ke nur nun atingis ĝin la bildoj de okazintaĵoj, kiuj antaŭ mil kaj mil jaroj havis lokon sur nia tero.

Surprizanta aspekto prezentiĝis al mi en la etero. Mi vidis grandan amason da brunaj graciaj homoj okupataj per konstruado de kolosa konstruaĵo. Ili projekciis, celis, fosis, martelis kaj segis grandiozajn ŝtonblokojn, ĉirkaŭhakis grandegain ŝtupojn. Alte super ili svarmis flugilmaŝinoj, kiujn mi komence konsideris diversformaj birdoj. Sed ili ne estis birdoj, ili estis aerveturiloj de tre diferencaj specoj, konstruitaj laŭ ĉiuj sistemoj, kiujn ni konas, sed ĉiu perfektigita ĝis la pleja perfekteco. De ĉie ili alvenis, laŭ la vento, kontraŭ la vento, rapidege alturniĝante, malrapide glitante proksime al la tero. Ili alvenis, tre ŝarĝitaj per sablo el la dezerto, per brikoj kaj per ŝlimo el Nilo, per kvadrataj ŝtonegoj. kaj ankaŭ per melonoj, daktiloj, bananoj, granatpomoj, bongustaj fruktoj el tropiklandoj amataj, kisataj de la suno. Piramida konstruaĵo poreterna ĝi estis, kiu prezentiĝis al mi kaj la flugilhavaj helpantoj forprenis de la bedaŭrindaj servutuloj la plej malfacilan laboron kaj alportis nutraĵojn kaj refreŝigaĵojn al ili. Ho, tiuj bonegaj bonfariloj, noblaj produktoj de l' kreanta homa spirito: jam tiutempe ili estis uzataj kaj ekzercataj kaj kun la praantikva kulturo ili estis malaperintaj de la tero.

Sed al mi, al mi estis lasite, reveki ilin al nova, senmezure plialtigita vivo. Kun ĝojega danko mi laŭdis mian sorton kaj en la sonĝo mi havis feliĉigan sonĝon pri mondo en plena florado de bonstato. Per miaj flugmaŝinoj — ili iĝis legiono — fable grandiĝis la interkomunikiĝo preparante la vojojn al negocado. Oni konis jam nur la nomon de mizero pro malsato; kiam en iu lando okazis malrikolto, alia, se ankaŭ situaciita sur la transa hemisfero,

tuj abunde prezentis manĝaĵojn al dispono, tre ĝoja, ke ĝi trovis konsumon por siaj riĉaj rikoltitaĵoj. La bonstato kreskis kaj kune la civilizacio. La sovaĝa avido estingiĝis; kiu mem ne tro severe suferas pro malhavo, tiu facile fariĝas bona favorulo. Kalumnio, tendencaj laŭdoj plu ne influis la juĝon de unu popolo pri alia; tiu ĉi juĝo formiĝis laŭ propra ekkono, laŭ propraj spertoj. El la kompreno kreskis la justeco, kiu l a s a s valori ĉion, kio estas valora; ligo formiĝis de spiritoj al spiritoj, arto de unuj vekis admiron de aliaj kaj ilia scienco fariĝis utila kaj respektinda al ili. Disigantaj limoj falis, fremduloj jam ne ekzistis, ĉiuj homoj havis nur unu hejmon ŝatatan per la sama arda amo — la teron.

Bonfariloj, saviloj el materia mizero estis la flugmaŝinoj por popolo antikva — kio ili povis fariĝi al progresinta epoko, tion ne elmezuras la fantazio de morteblulo.

Kaptita de ĝojebrio, estante feliĉega alportanto de feliĉo, mi flugis rekte kiel sago al la terglobo kaj direktis min al laborejo, en kiu diligentaj elpensantoj estis okupataj per konstruado de flugmaŝinoj. Dum iom da tempo mi observis ilian faradon kaj granda kompato min kaptis. Mi vidis ilian senĉesan klopodadon kaj ĝian malsukceson, la danĝerojn, al kiuj ili prezentis sin trokuraĝe, la seniluziigojn, kiuj atendis ilin . . .

Infanoj! Infanoj! mi estis krionta al ili kaj klarigonta la solvon de la granda enigmo. Jen ili komencis paroli, interkonsiliĝi, kaj mi ektimis, mi hezitis — kaj silentis.

Pri kio studadis tiuj elpensantoj? Kio estis la celo de iliaj klopodoj? . . . Al la celo de militoj estis servontaj iliaj flugmaŝinoj, ilojn por mortigo konstrui ili intencis. Al ili ne estis sufiĉaj iliaj de malproksime trafantaj kanonoj, kiuj, majstre manuzataj, falĉas vicojn da kontraŭstarantoj kiel herbon, kiel maturan grenon — el la nuboj ili volis veni, malsuprenkraki kiel fajra hajlo sur homojn fratojn, sur nian amatan hejmon: teron.

Dio viva, t i u j n ne lasu trovi la solvon. Tiujn ne! mi ekkriis kaj vekiĝis.

Tradukis *J. Schröder.*

SEN TITOLO.

En la lasta tempo alportis la gazetoj sciigon pri la 11. eldono de la angla ENCIKLOPEDIA VORTARO, eldonata de la universitato en Cambridge. La anglaj ĵurnalistoj nomas ĉi tiun 28 voluman enciklopedion „mirakla entrepreno“, „la plej granda de tiu speco, kiun iam vidis la mondo“. Ne estas ja mirinde, se la grandega 500-miliona angla nacio kreas al si post 144 jaroj detalan enciklopedion, kaj malpli mirinda ĝi estas, se ni konsideras, ke ĝin eldonas granda, riĉe dotata universitato, per subvencio de la

ŝtato, de ĉiuj famaj sciencistaj anglaj societoj kaj disponanta rimarkindajn monrimedojn — sed precipe per valora subteno publika. — Malgraŭ tio ni, Bohemoj, centfoje pli malgranda nacio, neniel bezonas iri flanken kun nia unua literatura entrepreno, la Enciklopedia Vortaro de Otto; ni povas ja eĉ kuraĝi la komparon de tiu ĉi bohema enciklopedio al la „mirakla" entrepreno angla. Super la „Encyklopediae Britannica" laboris 64 redaktoroj kun 1500 fakistoj por verki 40.000 artikolojn kaj duonmilionon da informoj. Nia „Ottův Slovník Naučný" (bohema titolo de tiu verko) havis 52 redaktorojn, 1100 kunlaborantojn fakajn kaj sciencajn, ĝi prezentas pli multe ol 150 000 artikolojn kaj devizojn kaj se ni volus aludi la kalkuladon de la detalaj informoj, ni atingus altegan ciferon, kiu ne multe diferenciĝus de la kalkulo angla. La E. Brit. enhavas 28 volumojn po 960 paĝoj — la nia havas la saman kvanton da volumoj po meznombre 1032 paĝoj — sekve la bohema enciklopedio estas pli enhavoriĉa. Por „mirakla" entrepreno angla la 7000 ilustraĵoj, 417 mapoj kaj 450 tutpaĝaj aldonoj ne signifas multe kompare al niaj 5067 ilustraĵoj kaj 479 grandparte koloraj mapoj kaj bildoj, kaj la komparo metas nin sur honoran lokon. En unu afero tamen ne konkuras la Leksikono de Otto kun la angla en la bilanco de la tuta entrepreno, kiun la anglaj gazetoj citas per kvin kaj duono de miliono da kronoj. La bohema eldonisto J. Otto neniam paradis, kiel grandegan sumon li devis disponigi por sia kolosa laboraĵo. Tio, kio alilande estas parado de la eldonisto, estus konsiderata ĉe niaj miniaturaj cirkonstancoj kiel — malmodesteco. La granda reklamo de la angla entrepreno kompreneble komerciste kalkulas duonmilionon da abonantoj. Verdire ĝi ne estas tro je riĉa nacio, kies lingvon oni parolas en la tuta mondo — duonmiliono da legantoj. Sed se oni tamen povas paroli ĉe instruiga verko pri duonmiliono da abonantoj, tiam ĝi pruvas, kiel estimas kaj ŝatas la kleraj Angloj tian verkon kaj kiel ili scias ankaŭ finance prizorgi sian reprezentan entreprenon. Sed malgraŭ tio, ke la Vortaro de Otto havis nek ŝtatan nek ian ajn alian subvencion, sed estas verko de unu sola entreprenema eldonisto, kiu ne ŝanceliĝis sola starigi je intereso de la nacio tion, kio alilande estis tasko de tutaj eldonistaj firmoj: tamen estas la Enciklopedio de Otto nia paradaĵo, vere nia nacia verko, kiu longe restos por la bohema nacio spirita trezoro (El „Národní Listy"). — Kiel konate, dediĉis la redakcio de nia Enciklopedio al Esperanto tri kolonojn en „Aldonoj".

EL LA MODERNA EGIPTUJO. Laŭ Herodoto estis bezone uzi por elkonstruo de la piramido de Ĥeops fortojn de cent mil personoj, kiuj dum dudek jaroj sklavigite laboris super la mate-

rialo por kies alporto mem ili konstruis dum dek jaroj ŝoseon. Ilia sola laborhepilo estis la levilo, rulbloko, kojno kaj glitveturilo. Kompare al tiu ĉi verko ni konsideru la plej novan teknikan miraklon de la anglaj inĝenieroj, kiuj post kvarjara laboro starigis proksime de piramidoj akvobarilon de Assuan, retenantan unu miliardon da kubaj metroj de akvo. Ĉi tiu laboraĵo de dektri mil homoj riĉigis tiel la nacian egiptujan havaĵon je 150 milionoj da Sm, ĉar sur la inundata teritorio da ducent mil ha estas kulturata jare kotono en prezo de 750 milionoj da Sm. La barilo alta 25 m kaj longa du km kostis 25 milionojn da Sm. Nova altigo de la barilo je pluaj sep metroj kostos 15 milionojn de Sm.

Sur la teritorio granda 113 milionojn da kv. km, okupata de la UNIVERSALA POŜTA UNIO loĝas 1115 milionoj da homoj, kiuj uzas pli multe ol 800 000 leterkestojn kaj 288.000 poŝtoficejojn. La Unio estis fondita la 9. de oktobro 1874 en Bern (Svisujo) de 22 ŝtatoj. Pli frue (jam en j. 1865) estis fondita en Parizo la telegrafa Unio, al kiu apartenis en 1901 jam 47 ŝtatoj.

